

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 23 n-ro 4 (96) 20.9.1972.
--	---

## SPUROJ DE ANTIKVAJ KULTUROJ EN LA BULGARA FOLKLORO

( S. ĜUĜEV, SOFIO, BULGARIO )+/

La bulgara folkoro ne povas kaj ne devas esti studata sendepende, aparte de la folkloro de aliaj balkanaj popoloj, de kies tradicioj ĝi formas nedisigeblan parton. Tial estas necese enkonduke trakti tre koncize iujn ĝeneralajn problemojn de la bulgara folkloro.

El lingva vidpunkto la Balkana duoninsulo montras konsiderindan diversecon kaj heterogenecon. Deko da lingvoj - ne kalkulante la idiomojn kaj la dialektojn - estas parolataj sur relative malvasta teritorio: albana, bulgara, cigana, gagaŭza, greka, makedona, rumana, serbokroata, slovena, turka ... Ĉiuj ĉi lingvoj determinas tiom da malsamaj nacioj, el kiuj ĉiu nacio kreis siajn buŝajn /senskribajn/ tradiciojn, sian folkloron, sian originalan kaj specifan stilon. Tamen spite al tiu ĉi diverseco de lingvoj, dialektoj kaj stiloj, la Balkana duoninsulo prezentas ian relativan homogenecon, ian similecon el vidpunkto de popolkulturo. Malgraŭ la riĉeco de naciaj kaj regionaj nuancoj, la folkloro de Sudokcidenta Eŭropo montras multajn komunajn trajtojn, kiuj karakterizas ĝin kiel nedivideblan kulturunuon kaj klare distingas ĝin disde la folkloro de la Centra, Norda kaj Okcidenta Eŭropo - unuflanke, kaj disde la folkloro de la Centra, Norda kaj Orienta Azio - aliflanke. Ĉar en la bazo de tiu ĉi eksterordinara diverseco kaj heterogeneco de naciaj kaj regionaj stiloj, lingvoj kaj kulturoj oni

+/ Bul. Ruski 33, SOFIO, Bulgario

trovas komunan substrukturon. Tiu ĉi komuna fundamento sentiĝas en la praktiko / verkado, reproduktado, plenumado / de preskaŭ ĉiuj popolartoj, sed ĝi estas plej facile konstatebla ĉe la verkoj de la poezio, de la muziko kaj de la danco. La simileco de stiloj, ritmoj, skaloj ktp. en la folkloro muziko de la balkanaj kaj proksimorientaj landoj estas plurfoje konstatita de eminentaj etnomuzikologoj kiel Raouf Yekta bey, Constantin Brâiloiu, Béla Bartók, Ahmed Saygun, Nikolae Rădulescu k.c. Se iu serbo, makedono aŭ bulgaro aŭskultas iun grekan, rumanan, turkan aŭ albanan muzikiston kanti aŭ ludi popolan melodion el sia lando, verŝajne li /ekzemple la bulgaro/ ne komprenos la parolojn de la teksto; sed li certe komprenos kaj eĉ ĝuos la melodion kaj eksentos la etoson de ĝia muziko. Plie: li akceptos ĝin kiel komponaĵon apartenantan alia propra muzika sistemo kaj respondantan al liaj propraj /naciaj/ estetikaj konceptoj. Ĉe diversaj balkanaj kaj proksimorientaj popoloj konstante cirkulas /"migras"/ pluraj variantoj de unu sama popolkanto aŭ de unu sama popoldanco - kaj tio pruvas, ke ekzistas komuna "fonduso" en la muzika folkloro de tiuj ĉi popoloj. "Certaj modalaj kaj kromataj strukturoj kaj nesimetriaĵoj ritmoj kovras plimalpli homogene la teritorion etendiĝantan de Karpatoj trans Balkano kaj Anatolio ĝis Kaŭkazo." <sup>1/</sup>

La komparaj studoj de la folkloro en la balkanaj landoj evidentigis multajn koincidojn kaj paralelismojn en la sfero de ritmo kaj de muzikaj skaloj /"modaloj"/, en la dekoraciaj elementoj, ornamaĵoj kaj finiĝoj, t.n. kadencoj de melodioj ĉe serboj, grekoj, bulgaroj, makedonoj, rumanoj, turkoj, albanoj. La simileco estas ankoraŭ pli trafa en la dancarto /ĥoreografio/. Sed ĝi evidentigas ankaŭ en la aliaj branĉoj de la folkloro: popola poezio, mitologio, proverboj kaj sentencoj, tradiciaj kutimoj, ludoj, ritoj, kredoj, superstiĉoj, teatraĵoj, pantomimoj ktp. Ekzemple oni eltrovis multajn koincidojn kaj paralelaĵojn en temaro de la popolaj rakontoj, fabeloj, legendoj, en ludoj kaj prezentaĵoj okaze de diversaj festoj /ekzemple ĉe kutimoj plenumataj okaze de la festoj de la Kristnasko, de la Sankta Georgo, de la Epifanio k.c./; en karakteroj, en agoj /faroj/, eĉ en nomoj de personoj, resp. heroj: majstro Manol, Marko Kraveviĉ, Mirĉo Vojevodo, reĝo Trojan kun azenaj oreloj ktp.; en geedziĝaj kaj entombigaj ceremonioj, en magiaj aŭ religiaj ritoj, dancoj kaj kutimoj: ekzemple "Rusaliaj"

<sup>1/</sup> Vidu: Nicolae Radulescu, Variante romanobałcanice ale unor melodii de dans si rituale, en Rivista de etnografie si folclor, Bucur, 1968, XIII 1, p.4 (2)

/kuracado per freneze rapidaj magiaj dancoj/, "Kaluĉaroj" /sabrodancoj/, "Lazarici" aŭ "Lazarki" /printempa danckutimo plenumata dum la festo de Sankta Lazaro/, "Peperuda" aŭ "Paparuda" /danca sorĉkantado por venigi pluvon/, "Nestinari" /greke "Anestenaria" - bakĥana danco incitanta ekstazon, dum kiu la partoprenantoj de la rito dancas nudpiede sur brulanta fajro, tretante la ardatajn ŝtipojn sen postsignoj de vundoj/ ktp.

Ĉiuj ĉi similecoj, koincidoj kaj paralelaĵoj formas la komunan heredaĵon /bazon/, kiu restas pli-malpli stabila, persistema tra diverseco kaj varieco de naciaj, regionaj aŭ lokaj formoj kaj stiloj. Kaj tiu ĉi substrukturo estas, tiel diri, pluretaĝa. Ĉar, dum varieco de formoj kaj stiloj naciaj, regionaj kaj lokaj estas dispartigitaj horizontale tra la diversaj etnikaj /etnografiaj/ teritorioj - - albana, greka, serba, bulgara ktp. - la ĝeneralaj trajtoj kaj karakterizaĵoj, kiuj formas la komunan substrukturen en la folkloro de la balkanaj popoloj, estas situantaj vertikale - sur la akso /koordinato/ de la tempo - kaj rezultiĝas el akumulo de pluraj sinsekvaj kulturoj, kreskintaj sur la Duoninsulo aŭ sur najbaraj teritorioj dum pluraj jarmiloj. Ĉiu kulturo lasis stampon sur la popolartoj de la loĝantaro, kaj tiuj "stampoj" sinsekvaj konserviĝis ĝis nia tempo, formante plurajn tavolojn en la folkloro de la nuntempaj balkanaj popoloj.

Sur tiu ĉi pluretaĝa fundamento kreskis ankaŭ la bulgara folkloro.

#### Spuroj de traca-friga-ilira arto

Unualoke, en la bulgara folkloro estas troveblaj spuroj de la antikva traca-ilira, aŭ, pli ĝuste, traca-friga-ilira arto. Se ni juĝas laŭ la legendoj pri Orfeo kaj lia doktrino aŭ se ni konsideras la mitojn pri Dioniso kaj la tutan religian praktikon ligitan kun lia kulto - ni rajtas konkludi ke la antikva Tracio estis areno /"ludejo"/ de tre malnova kaj tre alta muzika kaj ĥoreografia kulturo. Ne havante alfabeton, tiu ĉi kulturo postlasis neniajn skribajn tekstojn /dokumentojn/, ĝiaj ĉefverkoj restis neregistritaj sur papero kaj tial perdiĝis por la historio. Sed spuroj de ili konserviĝis en la memoro de la popolo dank' al la folkloro tradicio. La mitoj pri Orfeo, pri Linos kaj Muzeo, pri Eŭmolpo, Tamarido kaj Filamono, la legendoj pri Dioniso, pri la Menadoj, Klotonoj, Satiroj kaj Tiadoj estas nur malproksima eĥo de tiu malaperinta poezia, muzika kaj ĥoreografia kulturo. La ĉefaj epizodoj de la vivo de Orfeo kaj la fundamentaj principoj de la orfeisma religio kaj doktrino havis rektan rilaton al la muziko. Des pli

forte la dionisa kulto estis ligita al la danco. Amatoroj de la arkeologio, kiuj studis monumentojn de la antikvaj skulpto- kaj pentroarto, certe estis surprizitaj konstati, kiom multe da dancantaj figuroj /de bakĥaninoj, menadinoj, satiroj kaj de ordinaraj homoj/ konserviĝis en muzeoj kaj en privataj kolektoj, arĥivoj k.c. Oni rajtas supozi ke nombro de la perditaj monumentoj estas multoble pli granda. Sed, se vi vizitas iun folkloran feston en iu vilaĝo de Tracio, Makedonujo aŭ Mezio, vi estos ankoraŭ pli surprizita konstati, kiom multe movoj, gestoj, saltoj kaj korppozicioj de la bulgaraj popoloj dancistinoj kaj dancistoj estas similaj al tiuj de dancantaj figuroj de la arĥeologiaj monumentoj.

La frigoj mem, kiuj - laŭ grekaj fontoj - instruis al la antikvaj helenoj la instrumentan muzikon kaj pli speciale la "aŭlos"-muzikon /la t.n. "aŭletikon"/, estis popolo parenca al la tracoj kaj, se ni fidas al scienculoj kiel Otto Haas kaj Vlad. Georgiev, ĝis la duono de la dua jarmilo loĝis en la centro de la Balkana duoninsulo /nuna sudokcidenta Bulgarujo/. La bulgara folkloro konservis ĝis nun la memoraĵon pri la friga reĝo Midas kun oreloj de azeno. "La fontoj de tiu ĉi /Midas-/rakonto estas lokitaj en du malsamaj /kaj malproksimaj, rim. S.Ĝ./ punktoj: unu parto de ili troviĝas en Makedonujo, la alia - en la orienta limregiono de la Granda Frigio".<sup>2/</sup>

Ankaŭ la muzika kulturo de antikva Frigio ne forpasis sen lasi postsignojn. Hodiaŭ ni ankoraŭ retrovas en popolmuziko de la bulgaroj /ankaŭ de la grekoj, makedonoj, serboj kaj albanoj/ multajn strukturajn elementojn de la muzika formo - ritmojn, skalojn, kadencojn, konkludajn turnojn, modalojn, metrikajn figurojn - specifajn por la muzika folkloro de la landoj kaj regionoj en Malgrand-Azio, kie la frigoj establiĝis post la forlaso de ilia unua patrujo Makedonujo/. La superreĝo de la antikva friga muzikskalo, resp. modalo en la sudokcidenta Bulgarujo kaj en Makedonujo, samkiel en Armenujo kaj la okcidenta Turkujo, pensigas nin pri iuj postvivaĵoj de la friga kulturo en la bulgara muzika folkloro. La lingvisto Vladimir Georgiev observis similan fenomenon en la bulgara kaj en la armena toponimio kaj morfologio. Li eĉ parolas pri friga substrukturo en la moderna bulgara lingvo.

Ni do havas seriozajn kaŭzojn por insisti en la opinio, ke tiu traca-friga, resp. traca-friga-ilira kulturo postlasis spurojn kaj eĉ formis specialan, eble la plej profundan tavolon en la bulgara folkloro.

---

2/

Otto Haas, Die Phrygischen Sprachdenkmäler, Sofia, 1966, p.12.

## Postrestoj de la helena kulturo

Aliflanke oni povas trovi en la bulgara folkloro alian tavolon, formitan el postrestoj de la helena /malnovgreka/ kulturo. La influo kaj la kontribuoj de la grekoj en la antikva mondo estis tiom gravaj, ke tiuj postrestoj ne bezonas eĉ esti pruvataj. Male, estus absurde pensi, ke ĉiuj spuroj de la greka kulturo en la folkloro de balkanaj popoloj estas forviŝitaj. La amerika erudiciulo-helenisto Milman Parry, eksprofesoro de la Harvard-Universitato, opiniis ke la tradicio de la t.n. "aedoj" /antikvaj kantistoj, kiuj plenumadis la epopeojn Homerajn/ estas ankoraŭ vivanta; kvankam pli-malpli aliigita, kaj ke ĝin daŭrigas la popolaj kantistoj kaj guzlistoj ĉe iuj balkanslavaj popoloj: "Milman Parry havis la inspiritan ideon, ke se oni deziras klarigi la devenon de la malnovgrekaj Homeraj poemoj kaj la manieron de ilia plenumado fare de kantistoj, oni devas observi la vivon de la popolkantoj en tiuj regionoj, t.e. sur la Balkana duoninsulo, en kiuj ili estas plej bone konservitaj ĝis nia tempo. La heroo eposo de la sudslavoj, la t.n. "virkantoj" en tiu regiono, situas plej proksime al la tradicia tipo, kiu probable estis bazo de la Homera epopeo". 3/

Sed en la bulgara folkloro konserviĝis ankaŭ kelkaj strukturaj elementoj de la klasika verso. La poeto Asen Razcvetnikov, tradukinto de la "Iliado", retrovis la formon de la daktila heksametro Homera en la deksesilaba /aŭ duoble oksilaba/ sespieda verso tre disvastigita en la popola eposa poezio ne nur en Bulgarujo, sed ankaŭ en aliaj balkanaj landoj - Serbujo, Makedonujo, Kroatujo, Albanujo k.c. "Mi demandis min, skribis Razcvetnikov, ĉu tiu ĉi simileco estis nur hazarda, aŭ ĉu, kontraŭe, nia duobla nesimetria oksilabo /=oksilaba verso/

--- / --- / --- / / --- / --- / ---

estas en tre proksima rilato kun la ritmo de melodioj, laŭ kiuj estis kantataj la antikvaj heksametroj:

o o / - - / - o o / / - o o / - - / - o o " 4/

En alia loko ni jam montris multajn postvivafojn de diversaj, en la skriba poezio jam ne plu uzataj klasikaj antikvaj metroj kaj metrikaj piedoj /peonoj o o o - , epitritoj - - - o , doĥmiosoj o - - - k.c./, kiujn la popolkantistoj de la balkanlandoj uzas ankoraŭ en la ritmo de siaj melodioj. Ekzemple, la klasika piedo "epitrito", formita de tri longaj silaboj kaj unu mallonga inter ili / - - - /, notebla per muzikaj signoj por ritmo jene:  $\text{♩} \text{♩} \text{♩} \text{♩}$ , jam depost dekkvin jarcentoj malaperis el la cirkulado en la skriba poezio /post la malapero de la prozodia kvanto, t.e. de la longaj silaboj el la greka lingvo, en la VI jc./ . Tamen ĝi daŭrigas sian ekzistadon en la ritmo de melodioj, konstruitaj sur tiu piedo kaj postvivintaj siajn parolojn. Nome tiujn melodiojn /aŭ ties ritmajn modelojn/ ni retrovas hodiaŭ en la bulgara muzika folkloro. Ekzemple, la sekvanta bulgara melodio havas ritmon formitan ekskluzive el antikvaj epitritoi:

3/ Vidu: Serbo-Croatian Folk Songs ... by Béla Bartók and Albert Lord, Columbia University Press, New York, 1951, p.IX.

Ас. Разцветников, Български хекзаметър (Asen Razcvetnikov, La bulgara heksametro)

La supre menciita ritma kerno de tiu ĉi melodio, el kies okobla ripetiĝo estas konstruita ĝia ritma skeleto, estas identigebla en la epitritoj de la sekvanta verso de Eŝilo /"Persoj", verso n-ro 1056/:

κ̄χῑ μοῑ ἰ̄σ̄ν̄ε̄λοῦ̄ π̄ε̄ρ̄β̄ε̄ λ̄εῦ̄κ̄η̄ρη̄ ῥ̄ρῑχᾱ

Krome, la bulgara folkloro heredis de la malnovgreka kulturo la modalan sistemon de ĝia muziko. Suprafa statistiko, hazarde farita pri la disvastiĝo de la antikvaj skaloj kaj modaloj en diversaj partoj de la nuntempa Bulgarujo, montris superecon de la Dorida modalo en la orientaj regionoj, precipe apud la marbordo, kie estis multaj grekaj kolonioj en la pasinteco.

### La romaj kontribuajfoj

Triavice, ni tajtas hipotezi, ke estas ankaŭ konsiderinda tavolo de romaj kontribuajfoj en la bulgara folkloro. La almlito de la Balkana duoninsulo fare de la romanoj komenciĝis per la okupo de Makedonujo en la jaro 146. a. J. K. Sed la civiliza rolo de Romo en la Balkanlandoj kreskas precipe post la finiĝo de la intercivitanaj militoj. Jam en la unua jarcento de la Kristana erao la romanoj establiĝis sur la tuta teritorio de la duoninsulo. De la Adriatiko ĝis la Nigra Maro la romanoj konstruas pontojn kaj ŝoseojn, fondas urbojn, starigas citadelojn, malfermas vendejojn, loĝigas garnizonojn. La traca, iliria kaj macedona loĝantaroj, ĝis tiam praktikantaj la terkulturadon kaj la bestbredadon, nun komencas sin okupi per komerco kaj industrio, ekspluati minojn kaj arbarojn, lerni la grekan kaj la latinan lingvojn. Ilia kulturo, iliaj moroj kaj kutimoj, iliaj gustoj kaj konceptoj latiniĝas kaj grekiĝas. En la romaj legioj svarmas soldatoj rekrutigitaj el la balkanaj popoloj. La roma regado dum pluraj jarcentoj sur Balkano kaj la influo de la roma civilizo sur la indiĝena loĝantaro ne pasis sen lasi postsignojn ankaŭ en la bulgara folkloro. Adoptinte la "buŝajn", t. e. la folklorajn, tradiciojn de la submetitaj popoloj, la romanoj transdonis ilin al la poste venintaj. Tiel la karnavalsimilaj procesioj, kiujn la slava loĝantaro de la suda kaj norda Bulgarujo, de Makedonujo kaj Serbujo okazigas dum iuj tagoj de la jaro, ne ekzistas ĉe la aliaj slavaj popoloj. Tiuj bruaj procesioj de bunte kaj fantazie alivestitaj homoj/viroj/nomataj kukeri, kun maskoj de bestoj kaj multaj sonoriloj sur la korpo, ŝajnas esti postvivafoj de la antikvaj festoj/bakĉanalaj/honore al Dioniso-Bakĉo. Aliparte, la romanigitaj tracoj heredis de la romanoj la vintrajn festojn celebratajn honore al Saturno /la t. n. Saturnalia/ kaj retransdonis ilin al la slavoj venintaj en la valon de Danubo, kiuj ankoraŭ celebras ilin dum la festo de Kristnasko, indikante ilin eĉ hodiaŭ per ilia latina-slavigita nomo "kole/n/da" /lat. Calendae/. La adopto de tiu ĉi kutimo fare de la slavoj, resp. bulgaroj, okazis tre verŝajne antaŭ ilia kristaniĝo.

Alia interesa postvivafo de la roma kulturo en la bulgara kaj ĝenerale en la balkana folkloro estas la danca kutimo "Rusalia", rekte devenanta de la antikva-romaj festoj "Rosaria", "Rosalia" kaj "Brumalia". Tiu ĉi kutimo baziĝas sur la kredo je magia efiko de la danco kaj konsistas en plenumado de magiaj ritoj dum la dancado: kuracado de malsanuloj, sorĉkantado k. c.

Aliflanke la bulgara akademiano prof. Miĥail Arnaudov vidas en la bonoj kaj bondeziroj pri sano, riĉeco, feliĉo kaj bona rikolto, prononcataj de la floro de recitantoj /la t. n. "koledari"/ en la domo de mastro-gastiganto dum la festo de Koleda aŭ de Novjaro, postrestafojn aŭ postvivafojn de la roma terkulturista kulto, ligita kun la kredo al la genioj-protektantoj de la hejmo /lat. "lares domesticus"/. Tiuj genioj zorgas por la ekzistado de la familio, por la sano, la

bonhavo kaj la feliĉo de ĝiaj membroj: "En iuj regionoj de Rodopo, skribas Arnaudov, speciale en Nevrokop /hodiaŭ Goce Delĉev, rim.S.Ĝ./ kaj en Rupĉos estas desvastigita la kredo, ke ĉiu hejmo havas sian nevideblan protektanton, kiu kaŭzas ĉiun bonon aŭ malbonon kaj kiu aperas foje sub formo de serpento. Tiu ĉi mistera protektanto estas ordinare la spirito de iu el la prapatroj honorataj de la familio". 5/

### Influoj de la bizanca kulturo

En la kvina loko, oni ne devas neglekti la kontribuadon de la Bizanca-kristana kulturo al la folkloro de balkanaj popoloj. La ortodoksa kristana religio, kiu trovis sian plej perfektan esprimon en la civilizacio kaj en la soci-politika organizo de Bizanco, havis grandegan niveligan efikon sur la popoloj submetitaj al ĝia politika kaj kultura influo. Inter ili la balkanaj popoloj kaj tute speciale la bulgara popolo sentis plej forte la spiritan dependecon de siaj sudaj najbaroj. Al tiuj siaj alte kulturitaj najbaroj la bulgaroj, serboj, makedonoj, rumanoj, moldavoj kaj rusoj ŝuldas grandan nombron de siaj politikaj, administraj kaj kulturaj institucioj, siajn alfabetojn kaj siajn unuajn literaturajn verkojn, konsiderindan nombron da prunteprenitaj vortoj de siaj lingvoj, multajn uzaĵojn kaj kutimojn, multon da tio kio koncernas la estetikan kaj la etikan edukon de popolamasoj. Tial popolaj kantoj de la balkanlandoj, kaj speciale la bulgara folkloro, abundas je herooj kaj sanktuloj kristanaj. Post la kristaniĝo de la bulgaroj iliaj paganaj festoj aŭtomate transformiĝis en la kristanajn. La dioj, la gentoj kaj la herooj de la greka kaj roma Panteono estis simple rebaptitaj, ŝanĝis siajn nomojn. Tiel la festo de Koleda - festo esence pagana, per kiu estis celebrata la komenco de la suna jaro ĉe la romanoj - transformiĝis en feston de la Kristnasko.

La adaptiĝon de la paganismo al la kristana religio pruvas ankaŭ la fakto, ke dum la tiom imponaj dancoj de la nudpiedaj dancistinoj sur la brulanta fajro, la "Nestinarinoj" tenas en la manoj la ikonojn de la kristanaj sanktuloj Konstanteno kaj Helena, kies imagoj elvokas ĉe ili la staton de ekstazo. Same la ludo orakola, dum kiu juna knabino, ludanta la rolon de Pitio, eltiras el kaldrono la ringojn kaj la bukedojn de siaj kamaradinoj deponitajn je l'antaŭvespero kaj aŭguras, kiun junulon elektos la posedantino de la eltirita ringo. Dume la aliaj knabinoj formas ĥoron, kiu kantas profetaĵon en formo de enigmo. Tiu ĉi pure pagana kutimo estas plenumata plej regule dum la kristanaj festoj de "Enjv Den" kaj de la Sankta Basilo. Laŭ la sama maniero la kantoj kaj la dancoj de la floroj /"Rosaria"/, per kiuj la antikvaj romanoj celebris la printempan ekvinokson, miksiĝis, post la adopto de la kristanismo fare de la bulgaroj, kun la kristana festo de la Sankta Lazaro. "Tiamaniere la pagana rito nur ŝajne ricevis kristanan sencon, sed la plimulto de la tekstoj konservis dum la jarcentoj sian paganan kaj magian karakteron." 6/

### Slava folkloro tavolo

Je la kvina vicloko, en la bulgara folkloro evidentiĝas forta slava tavolo. La multnombraj slavaj gentoj, kiuj invadis la Balkanan duoninsulon en la VI jarcento de nia erao, ne estis jam sur barbara ŝtupo de sia socia evoluo. Ili montris, laŭ la esprimo de Paŭlo Ŝafarik, nivelon de relative alta civilizo, precipe de alta muzika kulturo, kiu manifestiĝas en iliaj popolkantoj /tiuj kiujn oni povas ankoraŭ aŭdi el la buŝo de rusaj, ĉeĥaj, slovakaj, serbaj kaj montenegraj kantistoj/. Ŝafarik rimarkigas, ke la originaleco kaj la nobleco de tiuj kantoj

<sup>5/</sup>Vidu: Mihail Arnaudov, Les influences grecques dans le folklore bulgare, en: Bulletin de l'Institut de Musique Sofia, 1969, p. 9.

<sup>6/</sup>V.M. Vasiljević, Narodne melodije Leskovačkog kraja, Beograd, 1960, p. 31.

montras jam frue disvolviĝintan spiritan kulturon ĉe la antikvaj slavoj. 7/

Nu, ili kunportis tiun muzikan, poezian kaj ĥoreografian kulturon en sian novan patrujon - inkluzive kantojn, dancojn, rakontojn, kutimojn, morojn, mitojn, fabelojn kaj legendojn - kiuj konsistigis novan, kvinan, tavolon en la bulgara kaj balkanslava folkloro. Ekzemple kantoj kaj dancoj ankoraŭ nun plenumataj en iuj vilaĝoj dum lamagia rito nomata "Paparuda" / "Papilio" / ĉe la bulgaroj kaj "Dodolica" ĉe la serboj / nomo de juna knabino ornamita per floroj, branĉoj kaj verdaĵo, plenumanta ritan dancon kun celo sorĉelvoki pluvon en periodo de sekeco / ŝajnas havi praslavan devenon. Sama aŭ simila kutimo ekzistas ne nur ĉe sudslavaj, sed ankaŭ ĉe aliaj slavaj popoloj - kaj tiu ĉi fakto konfirmas la hipotezon pri praslava origino de la menciita kutimo. Saman praslavan originon tre verŝajne havas la ritaj kantoj kaj feroj plenumataj dum la popola ludo nomata "laduvane" - speco de aŭgurado, dum kiu junaj knabinoj aŭ fraŭlinoj, formante ĥoron, per kantoj profetas pri sia estonta edziniĝo: ĉiu el ili fetas sian fingroringon, floran aŭ bukedeton en kaldronon plenan je akvo kaj la plej juna el ili eltiras kaŝe la fetitajn objektojn unu post la alia, dum la ĥoro per konvena kanteto / strofeto / "aŭguras" pri la estonta fianĉo aŭ edzo de la koncerna knabino. La multfoje ripetata rekanto kun la vortoj "Lado to Lado" aŭ "Oj Lado, Lado", estas verŝajne speco de "invokacio" / alvoko / adresita al la praslava diino Lada, pri kiu parolas Ŝafarik en sia "Historio de la slavaj lingvo kaj literaturo". 8/ Do, multaj spuroj de la praslava mitologio estas konservitaj en la nuntempa bulgara folkloro: Dodolica, Samodiva, Vila, Lada k.c.

La komuna trezoro de la malnovslava kulturo manifestiĝas precipe en la muzika folkloro de la nuntempaj slavaj popoloj, inkluzive la bulgarojn. La eminenta rusa muzikologo Feodosij Antonieviĉ Rubcov, profesoro de muzikfolkloro ĉe la Ŝtata konservatorio en Leningrad, montris multajn strukturajn elementojn, ritmojn kaj precipe melodiajn karakterizaĵojn / gamojn, modalojn, stereotipajn ornamentaĵojn, konkludojn, kadencojn ktp. / komunajn por la folkloro muziko de la slavaj popoloj. 9/ Tiuj komunaj karakterizaĵoj estas do postrestoj de la praslava muzika kulturo.

#### Pratataraj elementoj

Je la sesa vicloko, sur la fono de la bulgara folkloro formiĝis ankaŭ klare konstatebla / perceptebla / deponaĵo aŭ "tavolo" de elementoj pratataraj. Jam la hungaraj komponistoj Béla Bártok kaj Zoltan Kodaly trovis tiajn elementojn en la hungara muzika folkloro, nome: pentatonian / kvinŝtupan / gamon, t.n. "punktitan" aŭ sinkopan ritmon / ♩ ♩ ♩ /, kvartan aŭ kvintan transaranĝon / transponon / de la tataraj popoloj, ĉuvaŝoj kaj ĉeremisoj, loĝantaj en la regiono de la rivero Volga / Sovetunio /, Bartók kaj Kodaly konstatis en ties muziko la samajn karakterizajn elementojn. Lasttempe ankaŭ la bulgaraj etnomuzikologoj observis la samajn muzikajn fenomenojn en la folkloro de la slava loĝantaro en la Nordorienta Bulgarujo, dum la etnografoj malkovris plurajn identaĵojn, koincidojn kaj komunajn trajtojn en la arto kaj en la vivmaniero - moroj, kutimoj, stiloj,

7/ V. Paul J. Ŝafarik, Geschichte der slawischen Sprache und Literatur nach allen Mundarten. Offen, 1826. (II. Abdr. Prag, 1869, 2, 11)

9/ Rubcov F.A., Intonacionnye svjazy v pessennom tvorĉestve slavianiskih narodov, Leningrad, 1962, passim.

8/ Same kiel 7/



tradicioj - de la ĉuvaŝoj kaj de la bulgaroj el la sama /nordorienta/ regiono de Bulgarujo, kiuj nomas sin "kapanci" kaj, konforme al la popola tradicio, kredas sin posteuloj de la neslavaj prabulgaroj, samgentanoj de la ĉuvaŝoj. Nu, Ĉuvaŝujo situas je pli ol 2000 kilometroj for de Bulgarujo kaj de Hungarujo, kaj prabulgaroj kaj hungaroj deŝiriĝis de la komuna tataro /praĉuvaŝa/ gento jam antaŭ pli ol mil jaroj. Tamen elementoj de la pratatara kulturo, identigeblaj kun similaj elementoj ĉe hungaroj, ĉuvaŝoj kaj ĉeremisoj konserviĝis en la folkloro de la slava loĝantaro de la nordorienta Bulgarujo, kie la prabulgara /tataro/ malplimulto estis asimilita de la indiĝenoj kaj plene malaperis.

### Influoj de la otomana kulturo

Kaj, fine, la kontribuado de la otomana kulturo al la folkloro de la orient-eŭropaj landoj estas nekontestebla. Antaŭ ĉio - en la sfero de la paremiologio /la popola proverbaro/. La turka folkloro estas tiel riĉa je proverboj, aforismoj, sentencoj, maksimumoj kaj trafaj esprimoj aŭ simple kurantaj frazoj, ke ili jam per si mem prezentas tre riĉan lingvan kaj literaturan trezoron. Tiuj proverboj kaj esprimoj estis simple tradukitaj aŭ adaptitaj al la lingvoj de la aliaj balkanaj popoloj kaj tiel penetris en ties parolan /"buŝan"/ tradicion dum la otomana regado, kiam la turka lingvo plenumadis dum proksimume kvin jarcentoj la rolon de internacia lingvo tra la tuta teritorio de la imperio.

Tamen la influo de la otomana kulturo sur la folkloro de la submetitaj popoloj estis forta precipe en la sfero de la arta kreado kaj speciale de la muziko. Multaj turkaj kaj arabaj melodioj estas simple transplantitaj kaj adaptitaj al serbaj, grekaj, albanaj kaj bulgaraj tekstoj. Tia estis, ekzemple, la melodio de la bulgara patriota popolkanto "En Istambul beglik<sup>10/</sup> estas aŭkciata" /Vav Carigrad beglika se prodava"/:



La paroloj de tiu ĉi kanto laŭdas la prosperon de la kreskanta bulgara burĝaro, kiu, eĉ sub la jugo de la turkoj, ekonomie konkurencas jam kun la turkaj feŭduloj. Tamen la melodio estas simple prunteprenita el la trezorujo de la turka popola muziko.

Aliparte, krom la simpla transplantado de tute pretaj melodioj, la turka kulturo donis al la bulgara muzika folkloro specifan orientan stampon dank' al sia riĉa modala sistemo, kiun ĝi siavice ĉerpis el la araba muzika fonduso. Sekve de tiaspeca "maklerado" preskaŭ ĉiuj ĉefaj t.n. makamoj /t.e. modaloj, resp. tonskaloj/ de la persa-araba tonsistemo penetris en la muzikan folkloron de la balkanaj kaj sud-orient-eŭropaj landoj. Tiamaniere sub influo de la turka muziko, en la bulgara folkloro ankoraŭ nun cirkulas multaj melodioj konstruitaj sur la modalaj skemoj de la "makamoj": Hiĝas /E - F - Gis - A - H - C - D - C/, Karĝagar /D' - E - F - G - As - H - C - d/, Hiĝaskjar /E - F - Gis - A - H - C - Dis - e/ k.c., menciitaj aŭ pristuditaj de turkaj, arabaj kaj persaj muzikologoj. Dum la kunloĝado aŭ la najbareco de la musulmana -turka kaj la kristana-bulgara popoloj, inter ili estis registritaj ne nur konfliktoj, luktoj, militoj kaj malamoj, sed ankaŭ momentoj de paco, eĉ de amikeco kaj kunlaborado, de kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj, kiuj helpis la interpenetron de la folkloraj verkoj kaj reciproke influon de la naciaj muzikaj stiloj.

10/ "Beglik" (turka vorto) - imposto sur la posedo de brutaro kaj, metafore, rajto kolekti tiun imposton. Tiun rajton la iama registaro vendadis aŭkcie ĉiujare al riĉaj privatuloj, kiuj kruele ekspluatis la brutbredistojn.

## Interpenetro de folkloroj de invadintoj kaj de indiĝenoj

La senĉesaj invadoj de diversaj triboj kaj popoloj en la balkanaj landoj ne sukcesis neniigi ĉiujn kulturajn, resp. folklorajn monumentojn de la indiĝena loĝantaro. Tia fenomeno estus povinta okazi nur ĉe unu sola kondiĉo: se la invadinto estus sukcesinta ekstermi la malnovan loĝantaron ĝis la lasta individuo. Tamen, ĉe la cirkonstancoj de l'iamaj militmetodoj - manko de nukleaj militiloj - tia kazo ĝis nun neniam prezentiĝis. Plej ofte okazis speco de "osmozo" aŭ interpenetro, dum kiu kulturaj valoroj transverŝiĝas el unu popolo al alia, plej ofte el indiĝena loĝantaro al invadintoj. /Ĝenerale la malpli civilizitaj kaj pli malriĉaj gentoj aŭ popoloj, serĉante nutraĵon aŭ rabaĵon, atakadis la pli civilizitajn kaj la pli riĉajn/. Kaj la invadintoj alproprigas al si ne nur la materiajn riĉaĵojn de la venkitaj popoloj, sed ankaŭ ilian kulturon; la venko donas al ili ne nur ekonomian kaj politikan avantaĝon, sed disponigas al ili ankaŭ la trezorojn de la spirito, ĉiujn ĉefverkojn de la arta kreado, de la poezio, muziko, danco, teatro k.c. Tiuj trezoroj konsistigas la popolajn tradiciojn, la folkloron de la nova loĝantaro. Do, anstataŭ perdiĝi, la malnova kulturo simple fariĝas posedaĵo de la novevenintoj, kaj la folkloraj tradicioj - kantoj, dancoj, ludoj, legendoj, kutimoj kaj uzoj - tiamaniere konserviĝas en la memoro de popolo. Ili estas komunikataj de generacio al generacio kaj amasiĝas en la trezorujo de folkloro, formante tie sinsekvajn tavolojn similajn al la aluvioj de la tera krusto.

Tiamaniere, la interkruciĝo de pluraj sinsekvaj kulturoj formis en la bulgara folkloro kelkajn tavolojn de diversaj naciaj stiloj. En ĉiu tavolo kaŝiĝas eroj de altvaloraĵoj, simile al arkeologiaj kaj paleontologiaj trovaĵoj, kiujn sciencistoj elfosadas el sino de la tero, kaj kiuj aperas ankaŭ sub formo pli-malpli aliigita kaj dispecigita. Same kiel la arkeologoj kaj la paleontologoj, kiuj devas rekunmeti kaj kunglui la disfetitajn membrojn de siaj trovaĵoj, por rekonstrui, ekzemple, la formon de iu statuo, vazo, de iu ŝtonigita korpo aŭ skeleto, la folkloristoj ofte devas kunmeti diversajn elementojn de folkloro verko, aŭ elimini la fremdajn elementojn, por restarigi ĝin. Tamen la arkeologoj kaj la paleontologoj laboras en pli favoraj kondiĉoj ol la folkloristoj. La teraj tavoloj estas vicigitaj sinsekve - unu sur la alia - kaj tiamaniere ili donas la kronologian bildon de la pasinteco: oni povas eĉ fiksi la proksimuman aĝon de trovitaj objektoj, la pli-malpli ekzaktan daŭron de ĉiu fenomeno. Nu, la folkloraj tavoloj, kvankam

formiĝintaj sinsekve en la pasinteco, nun kunekzistas samtempe sur unu sola kaj unika areo - kaj la folkloristo devas difini per specialaj kaj ofte tre komplikaj metodoj la epokon aŭ la devenon de ĉiu aparta tavolo kaj de ĉiu struktura elemento.

### Konkludoj

La tavolo akumuligo de heterogenaj esprimmanieroj kaj strukturelementoj devenantaj el pluraj sinsekvaj kulturoj kreskintaj sur nia teritorio, transformis la bulgaran folkloron en ian mozaikon de stiloj, kiu dum jarcentoj fariĝis pli-malpli homogena kaj unueca. En ĝi, la naciaj, gentaj kaj regionaj apartaĵoj kaj strukturelementoj tiel miksiĝis, aliiĝis kaj preskaŭ perdiĝis, ke hodiaŭ ili tre malfacile povas esti identigataj kaj distingataj. Nu, unu el la plej gravaj kaj samtempe plej malfacilaj taskoj de nia folkloroscienco konsistas en tio, ke ĝi devas detekti diversajn tavolojn de sinsekvaj kulturaj unfluoj en la bulgara folkloro, identigi kaj diferencigi diversajn stilojn, naciajn kaj regionajn nuancojn aŭ apartaĵojn kaj strukturajn elementojn en diversaj artverkoj - kantoj, dancoj, ludoj, kutimoj k.c. - kaj, apartigante ilin, entrepreni komparajn studojn kun similaj aŭ parencaj stiloj kaj formoj en la folkloro de aliaj balkanaj kaj eksterbalkanaj popoloj. Tiamaniere la folkloro scienco povus esplori la problemon pri la malproksimaj fontoj de la bulgara popola arto, pri la restaĵoj de antikvaj kulturoj en la bulgara folkloro.

Ĉiuj observoj kaj studoj faritaj ĝis nun sur la popola muziko, danco, poezio kaj teatro malkovris spurojn de tre antikva kaj tre altnivela muzika, ĥoreografia kaj poezia kulturo sur la Balkana duoninsulo - kulturo kiu certe ekzistas en stato "tradicia", t.e. ne postlasinta skribajn dokumentojn. Mi estas firme konvinkita, ke la komparaj studoj sur la folkloro de la balkanaj kaj sud-orient-eŭropaj /eble ankaŭ proksim-orientaj/ landoj kontribuos kaj ege helpas por "elfosi" kaj trastudi la restaĵojn de tiu droninta kulturo, restarigi ĝiajn artajn monumentojn /aŭ parton de ili/, la ĉefverkojn de ĝia muziko, poezio, danco, teatro. Se la arkeologiaj fosadoj de esplorantoj kiel Schliemann, Evans k.c., inspiritaj nur de la mitologio kaj la popola tradicio, sukcesis eltrovi la palacon de Priamo, la labirinton de Minoso en Knoso, la citadelon kaj la palacon de Agamemnono en Mikeno, la galerion de Tirinto kaj la freskojn en Piloso - kial do la folkloraj studoj, la "pioĉadoj" kaj la "fosadoj" en la profundaj tavoloj de la kolektiva /genta/ memoro aŭ "animo" de la popolo ne sukcesus eltrovi aŭ reszarigi tiujn el la

monumentoj de tiu droninta kulturo, rekonstrui la ĉefverkojn de ĝia muziko, danco kaj poezio? Se Bártok kaj Kodaly sukcesis, dank'al la kompara metodo, revivigi la antikvan hungaran muzikan kulturon ekzistintan antaŭ pli ol mil jaroj kaj kaŝitan sub la pli malfruaj akumulaĵoj de fremdaj influoj - kial do la bulgaraj folkloristoj - sekvante la saman metodon - ne povus eltrovi kaj revivigi la malnovan arton muzikan, ĥoreografian kaj poezian de la antikvaj tracoj, iliroj, mizoj kaj frigoj? Se la mitoj pri Orfeo, pri Tamirido, pri Lino kaj Eŭmolpo konserviĝis, dank'al la popola tradicio, dum miloj da jaroj - ĉu ni rajtas senape-lacie aserti ke la kantoj, la melodioj, la ritmoj kaj la akordoj de tiuj inspiritaj muzikistoj kaj poetoj estas senrevene, senespere perditaj por la homaro? Aŭ ke la graciaj gestoj, saltoj, turnoj kaj paŝoj de la balkaninoj, la ekstazaj dancoj de la menadoj, de la klotonoj, satiroj kaj tiadoj estas por ĉiam forviŝitaj el la memoro de la postaj generacioj, lasinte nenian spuron?

La manko de skribaj monumentoj aŭ dokumentoj tute ne devas malesperigi la esploristojn. La situacio estis analoga, eĉ pli malesperiga, ĉe la kompara lingvistiko en la epoko de Franz Bopp kaj August Schleicher: neniam skribitaj dokumentoj ekzistis pri la mortinta pralingvo. Sed la hinda-eŭropa lingvistiko, utiligante la komparan kaj la induktan metodojn, sukcesis retrovi kaj eĉ ĝis certa grado restarigi la praan hindeŭropan idiomon, kiu estis parolata en la antaŭhistoria epoko kaj kies fonetiko, morfologio kaj leksiko neniam estis fiksitaj per skribaj tekstoj.

Analoge la folkloro scienco, la komparaj etnomuzikologio kaj etnoĥoreologio, sekvante la saman induktan metodon kaj profitante la sperton kolektitan de la lingvistiko kaj de la arkeologio certe sukcesos feti lumon sur la problemon pri la origino de la muzikaj kaj ĥoreografiaj lingvoj kaj dialektoj de la balkanaj popoloj. Ĝi povus ankaŭ prepari grundon por la elserĉo kaj parta restarigo - almenaŭ en ĝeneralaj trajtoj - de la muzika kaj danca sistemoj de l'antikvaj tracoj, frigoj, iliroj kaj mizoj. Ĉio ĉi estas nur problemo de metodo.